La eldonejo de SAT jam donis al ni vere eminentajn librojn, kiaj estas du volumoj de «Leteroj de Zamenhof», «Plena Vortaro de Esperanto» k.a. Nun ĝi prezentas al la esperantistoj gravan klasikaĵon de la franca literaturo en tre bona traduko bele prezentita.

La verkoj de Voltaire estas mondfamaj pro sia beletra valoro. Liaj teatraĵoj, en ok dikaj volumoj, estas fiero de la franca klasika literaturo.

La tri libroj tradukitaj de E. Lanti estas rakontoj genie plektitaj kun socia celo: detruado de la malvirtoj de la tempo de la Aŭtoro. Pri Voltaire Guerra Junqueiro diris, ke li preparis bombegon, metis fajron al la meĉo kaj ridante kaŝiĝis en tombon por de tie sendanĝere aŭskulti la eksplodegon; ĉar Voltaire inteligente atakis la krimojn de sia tempo, mortis en la jaro 1778 kaj en 1789 eksplodis la Franca

Revolucio, kiu estis vera bombego por la lando kaj por la mondo, kaj ŝanĝis por ĉiam la mondkoncepton pri regado de lando. Ĝi faligis por ĉiam la feŭdo-sistemon, dum kiu la povo de la regantaj klasoj — reĝo, aristokrataro kaj pastraro — estis absolutaj. La popolo estis vere sklavigita de tiuj klasoj. Por faligi la regantajn klasojn kaj starigi novan politikan organizaĵon, la Revolucio senkapigis milojn da granduloj. Riveroj da sango dum 5 jaroj kovris la teron de Francujo.

En la tri rakontoj, kiuj per la traduko de Lanti akiris pli freŝan vivon tra la mondo en ĉi tiu volumo, la virtaj homoj estas viktimoj de la malvirtutoj, kiuj ilin senkompate turmentas. La altajn sociajn postenojn akiras la edzoj de la plej belaj virinoj pere de voluptamaj pastroj kaj nobeloj. Ne mono subaĉetas la potenculojn, ĉar da oro ili havas multe; la koruptilo estas belaj junaj virinoj. Ĉian provon protesti silentigas la muroj de Bastilo aŭ la fajro de Inkvizicio, kiu estas ĉiopova.

La lingvo de la traduko estas klara kaj korekta, kun escepto de intencaj kapricoj de Lanti, kiu ofte ne uzas kutimajn sufiksojn kaj diras, ekzemple, *virgino* anstataŭ *virgulino*. Pri tio ĉi li mem avertas en la antaŭparolo (p. 11),

kaj laŭ lia kutimo metas la radikon *ali* inter la korelativojn, t. e. skribas *aliu*, *alies*, *aliel ktp.* En kelkaj lokoj estas erare uzata la estanta anstataŭ la estinta pasiva participo, ekzemple *mortigata*, *mortpafata*, *pendigata*, anstataŭ la korektaj formoj *mortigita*, *mortpafita*, *pendigita*, pro ia malprava timo de konfuzo de pluskvamperfekto kun preterito perfekta, kiuj havas la saman formon en Esperanto. Ĉi tiu lasta erarformo estas defendata de kelkaj esperantistoj, sed tute malprave, ĉar Esperanto efektive ne uzas ĉiujn verboformojn de la okcidentaj lingvoj, sed nur tiujn de kelkaj orientaj lingvoj. La finaĵo *-is* de Esperanto anstataŭas kvar finaĵojn de la portugala kaj aliaj okcidentaj lingvoj: *li amis* povas esti tradukata per *amou*, *amava*, *amara*, *amasse*.

Krom tiuj bagateloj, la lingvo estas modela, la konstruo de la frazoj estas imitinda.

Resume: libro altvalora, kiun ĉiu esperantisto fieros posedi kaj ofte re-trelegi. Ankaŭ rimarkinde kiel montro de internacia kunlaborado de esperantistoj: la libron p'esis Ljubljana pre-sejo.

TEATRO EN SOCIETO, originale verkita de Emilja Lapenna, Mirko Mamuziĉ, Shertse Mulo. 84 p. 11 x 16 cm., broŝ. Eldonis Kroatia Esperanto-Servo, Zagreb, Amruŝeva 5/1. 1 vol. Prezo ĉe la libroservo de BEL Cr\$ 6c,00.

Dekduo da teatraĵetoj por Esperantistaj festoj aperas en tiu bela libreto. La plej multaj estas sufiĉe universalaj por esti interesaj en ĉiuj scenejoj de la mondo. Kelkaj estas iel

amatorecaj, ne montras altan talenton, ĉar ili ne igas nin ridi nek plori; sed dank'al la korekteco de la lingvo ankaŭ tiuj plaĉas al esperantistoj.

Ju pli multe oni uzos Esperanton por teatro, des pli bone por instrui fluan parolon en nia lingvo; tial ĉiuj teatraĵoj en Esperanto estas bonvenaj. La leganto korektu la jenajn preserarojn:

- P. 1, linio 6: enscenigis, kie estas: nescenigis.
 P. 16, linio 20: kredas, kara kie estas: kredas kara.
 P. 25, linio 10: *demeti mian mantelon*, kie estas: «demeti mia mantelo».
 P. 25, linio 11: *loki mian kofreton*, kie estas: «loki mia kofreto».

Tiuj eraroj de la persono Suzana estas intence faritaj por montri ŝian mallertecon, sed ili instruus erarojn al la novuloj.

- P. 29, linio 23: mem, kie estas: men.
 P. 32, 6 (de malsupre): silentas, kie estas: silantas.
 P. 35, 10: cindro, kie estas: cindro.
 P. 38, lasta linio: S-ino, kie estas: S-mo.
 P. 39, linio 2: tion, amikoj, kie estas: tion amikoj.
 P. 52, linio 2: KVERELO, kie estas: KVARELO.
 P. 52, linio 10: Salutegon, mia kara! Kie estas: Salutegon mia kara!
 P. 52, lasta linio: ion, mia kara, kie estas: ion mia kara.
 P. 53, linio 27: Ne koleru, kara, kie estas: Ne koleru kara.

- P. 54, linio 3: Kveremulo! kie estas: Koremulo!
- P. 54, linio 18: bezonas, kie estas: bezanas.
- P. 54, linio 25: Sentaŭgulo, kie estas: Sentaŭgulo.
- P. 56, linio 11: skribtablo, kie estas: skribtalbo.
- P. 56, linio 19: aŭskultu. Bob, kie estas: aŭskultu Bob.
- P. 65, linio 18: *en mano*, kie estas: *ne mano*.
- P. 66, linio 14: salutis, kie estas: salucis.
- P. 66, linio 24: nomo kie estas: mono.
- P. 71, linio 7: rigardas, kie estas: rigadas.
- P. 77, linio 5: ĵurnalistoj, kie estas: ĵŭrnalistoj.
- P. 78, linio 9: ĝojige, kie estas: ĝoige.
- P. 80, linio 11: ricevis, kie estas: rivecis.
- P. 83, linio 16: piratajn botojn, kie estas: piratojn botojn.
- P. 83, linio 28: laŭ, kie estas: lau.

La libreton oni uzu ankaŭ kiel gvidlibron de konversacio, kiu nun mankas en Esperantujo. Dank'al al simpleco kaj korekteco de la lingvo, ĝi povos esti tre utila en daŭrigaj kursoj.

Martinus — ĈIRKAŬ LA NASKIĜO DE MIA MISIO — Tradukis C. Graversen. Kontrolita de la Literatura Komitato de S.A.T. — Eldono de La Spirit-Scienca Instituto de Martinus — Kopenhago 1956. 1 vol. bele bindita, 60-paĝa, 12 x 18 cm. Pre-

zo en la libroservo de B.E.L. Cr\$ 120,00.

La unua impresado tre agrabla ĉe la vido de ĉi tiu volumo estas la ĉarma prezentado: bonega papero, perfekta preso, bela bindaĵo. Ĉio plaĉas al libro-amiko en la eldonadoj de tiu Instituto.

La celo de la verko estas klarigi, ke la biblia Dio ne mortis kaj la fenomenoj iam priskribitaj de la Profeto okazas ankaŭ en nia tempo: homo povas ricevi la viziton de Dio kaj per dia inspiro fariĝi profeto por plenumi gravan mision antaŭ la homaro.

Post detalaj antaŭklarigoj, la Aŭtoro en la ĉapitroj 11, 12, 13 priskribas la ricevon de la Dia Spirito, kiu invadis lian korpon dum meditado kaj esence ŝanĝis lin je supere inspirita estulo, kiu amas ĉion kaj ĉiujn en la Universo kaj povas detale klarigi kaj analizi ĉiujn vivofenomenojn el spirita vidpunkto por helpi la homaron atingi pli altan ŝtupon en la vojo de spirita progreso.

En kelkaj sekundoj ĉio ŝanĝiĝis en lia persono kaj li komencis vige kaj kuraĝe sian mision. Li estis 30-jara kiam li ricevis tiun altan mision, kiun li plenumadas jam de pli ol 30 jaroj. Li postlasos grandan verkon kun la titolo «La Libro de la Vivo» kaj aliajn malpli grandajn kun detaloj pri la vivo kaj pri la devoj de la homoj.

Al mi persone liaj ideoj tre plaĉas kaj mi neniel dubas pri lia misio; sed certe aliaj legantoj pensos alimaniere. Pri unu punkto tamen ni ĉiuj certe konsentas, nome, ke la misio de Martinus pliriĉigas la Esperantan li-



Brazila Kroniko

AMAZONAS

Manaus — La Grupo Esperantista Amazonas Verda Stelo eldonis en julio 4-paĝan «Boletim Comemorativo». Ĉi tiun memorigan Bultenon, eldonitan okaze de la Ora Jubileo de Brazila Esperanto-Ligo kaj de la XV Brazila Kongreso de Esperanto organizis nia malnova samideano S. Augusto, kiu «semas kaj semas, nenian laciĝas».

ALAGOAS

Maceió — Nia veterana samideano Paulino Santiago daŭrigas ĉiusemajne verki interesajn, eruditajn kronikojn pri Esperanto en «Gazeta de Alagoas». En la numero de 19 de Majo li konvinke kontestis kaj refutis malican kritikan artikolon subskribitan de Junio (pseŭdonimo) presitan en la gazeto «O Semeador» (La Semanto) de 6 de Majo, organo de la ĉefepiskopado de Maceió. Tion okazigis la oficiala decido doni al strato en la ĉefurbo Maceió la nomon «Zamenhof». Junio citis, inter aliaj, Pasteur kaj Camões, kiel pli grandaj ol Zamenhof; tamen, oni ne donis en Maceió ilian nomon al stratoj. Paulino Santiago montris ke Junio estas

teraturon kaj la pensaron de la homoj. Li havos fervorajn kredantojn, kiuj eternigos liajn librojn same kiel la antikvaj profetoj de Izrael ĝis nun havas legantojn, kvankam neniu el ili havis en sia tempo mondlingvon kaj presarton.

I. G. B.

malsincera aŭ nescias plene la aferon pri Esperanto.

SERGIPE

Aracaju — S-ro Zózimo Lima klopodas, precipe per la gazetaro, revivigi esperantistan grupon en tiu Ŝtata Ĉefurbo, kie antaŭe multe laboris por nia lingvo la neforgesebla Alcibiades C. Paes. Niaj samideanoj Norma Reis kaj Cesartina Regis helpas al la laboro.

BAHIA

Itapetinga — Itapetinga Esperanto-Klubo estas la nomo de ĵus fondita E. — grupo en tiu prospera urbo. La prezidanto de la Klubo, Prof. Pessoa, faras kurson kun pli ol 20 gelernantoj.

MINAS GERAIS

Caratinga — Caratinga-Esperanto Grupo ricevis signifoplenan omaĝon de la Komerca Lernejo «S. Domingos de Gusmão», kiu havas en sia programo la instruon de Esperanto. La Lernejo disponigis al la Grupo bonegan ĉambbron por kunvenoj, kurso, biblioteko, festoj.

Uberaba — Nia samideano Sebastião Alves da Silva instruas nian lingvon al siaj samurbanoj dezirantaj ĝin lerni.

SÃO PAULO

Taubaté — Kiun plezuro ni sciigas, ke laŭ informo de nia samideano prof. Waldomiro B. de Abreu, estis tre fruktodona la E-kurso kiun li faris en tiu naskourbo de Monteiro Lobato.



O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO



AUSTRIA — O Ministro da Instrução e a Câmara dos Trabalhadores e Empregados de Viena concederam subvenções de 1000 xelins à Austria-Esperanto-Federacio.

CHECOSLOVÁQUIA — A mundialmente conhecida estação balneária Karlovy Vary (Carlsbad) edita uma revista com ilustrações e úteis informações, que tem inserido artigos em Esperanto. Agora a empresa deseja fazer uma edição da revista toda em Esperanto, e espera que seja ela bem recebida por nossos samideanos. Endereço de Centra Informa Servo: Strato I. P. Pavlova 2, Karlovy Vary Checoslováquia.

CHINA — O movimento esperantista anima-se na China. Em Pequim, sua capital, após um período de 3 anos funciona um curso de Esperanto.

ESPAÑHA — O 18.º Congresso Espanhol de Esperanto, realizado em Madrid durante uma semana, em Julho, teve extraordinário êxito. Sua descrição feita por nosso eminente samideano Luís Hernandez, no Boletim da *Federacion Esperantista Española* (Ag. Set.) é empolgante, encantadora. Inscreveram-se 361 samideanos, comparecendo 307.

FRANÇA — Em Julho houve em Les Milandes, próximo a Sarlat, Dordogne, um Congresso Anti-racista, organizado pela artista francesa Joséphine Baker, bem conhecida no Brasil. Na reunião vieram-se ingleses, holandeses, alemães, espanhóis, chineses, além de muitos franceses. Convidados a participar do Congresso compareceram diversos esperantistas do sudoeste da França, os quais fizeram exposições sobre a obra de Zamenhof. Joséphine Baker convidou os assistentes a procurar conhecer a nossa língua.

GUATEMALA — Guatemala Esperantista Asocio começou a editar seu órgão "Guatemala Esperanto Bulteno", redigido em espanhol e Esperanto, e que será publicado de 2 em 2 meses.

HOLANDA — O 30.º Congresso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) foi este ano em Rotterdam, de 4 a 9 de Agosto. Inscreveram-se 678 congressistas, tendo comparecido 590, de 15 países. O pequeno Congresso infantil, que se realizou por essa ocasião, contou com 61 crianças, de 7 países. O trabalho da Comissão organizadora foi grande, mas produziu notável resultado.

O próximo Congresso de SAT será em Helsinki, capital da Finlândia, em Julho de 1959.

— Com grande brilho realizou-se em Eindhoven o V Beneluxa Esperanto-Kongreso, de 2 a 10 de Junho. Tomaram parte 200 samideanos, entre eles franceses, alemães e norte-americanos. Orou na sessão solene o Prefeito Mag. Dr. Ch. van Rooy. Ao mesmo tempo, em salões diversos, fizeram suas costumadas reuniões solenes anuais as associações: Niderlanda Ligo "La Estonto estas Nia"; Flandra Ligo Esperantista e Reĝo Belga Ligo Esperantista.

HUNGRIA — Hungria Esperanto Ligo organizou em Budapest grandiosa exposição de Esperanto. O presidente, Julio Baghi, inaugurou-a com animada alocação e depois começou um curso para novos adeptos. Nessa ocasião o Governo editou dois selos postais: um, com a estrela e os dizeres "Esperanto, Lingvo Internacia 1887-1957", em um globo; outro, verde, com o retrato de Zamenhof, sua assinatura, a estrela e os dizeres: "1887-1957 — Aŭtoro de Esperanto".

BIBLIOGRAFIO

MÉTODO ELEMENTAR DE ESPERANTO (para rádio e correspondência) pelo prof. *C. Torres Pastorino*, catedrático de latim no Colégio Militar do Rio de Janeiro, e do Colégio Pedro II. Com a colaboração do prof. *Jorge Soares das Neves*. Liga Brasileira de Esperanto. Rio de Janeiro, 1956. Distribuidores Irmãos Pongetti, Distrito Federal. Preço Cr\$ 60,00.

Ĉi tiu libro enhavas la lecionojn donitajn de ĝia aŭtoro en la per-radia Esperanto-kurso farita ĉe la oficiala Radio de Ministrejo de Edukado kaj Kulturo. Pro tio, kompreneble la verko diferencas de la aliaj lernolibroj destinitaj al kursoj faritaj en ĉeesto de la instruisto, aŭ speciale por memlernantoj.

La atenta legado de ĉi tiu libro rememorigos la radio-gelernantojn pri la lecionoj akurate aŭskultitaj dum la kurso, kaj certe ili fariĝos bonaj samideanoj.

La facila akcepto atingita de la eldono montras ke bone agis la aŭtoro, kolektante la perradiajn lecionojn por ilin konservi per eldono.

Mankojn, erarojn, nature la kritikuloj trovos en tiu praktika metodo. Sed kiu estas la Esperanta lernolibro, vortaro, terminaro, ne havanta iajn ajn malkorektajn? Oni ĉiam trovas kritikindaĵojn, kaj ili estas menciendaj, por ke ili povu esti fariĝitaj okaze de nova eldono.

Rakontoj el la naciliberiga batalo de jugoslaviaj popoloj — Elektis kaj tradukis Antonije Sekelj — N-ro 5 de la Biblioteko "Nova Libro" Eld. Serbia Esperanto-Ligo, Beograd — 35 p. 1916.

La aŭtoro kolektis kaj tradukis rakontetojn el plumoj de diversaj partoprenintoj de la naciliberiga batalo.

Sonetkrono por la esperantistaro — Prof. Svetislav S. Petroviĉ. N-ro 6 de "Nova Libro" Beograd — 16 p. Okaze de 70-jara jubileo de Esperanto (Julio 1957).

32-paĝa broŝureto, enhavanta 15 sonetojn verkitajn de Prof. Petroviĉ. En

ĉiu soneto la lasta verso de la dua versotrio estas la unua verso de la unua verskvaro.

Jarlibro 1957 — Unua parto. U.E., A (en konsultaj rilatoj kun Unesco). Nur por uzo de membroj. 344 p. Estraro de UEA. Adresaro de la Delegitoj, Komitato de UEA, Honoraj Prezidantoj kaj Membraro, Dumvivaj Membroj, Regularo pri informpeto, kaj multaj aliaj interesaj informoj.

Prometeo — n.º 1, 1956. Trimonata sendependa gazeto — Osaka, Japanujo. Sociaj kaj ekonomiaj problemoj, scienco, literaturo, arto, Esperanto.

PROSPEKTOJ KAJ FALDFOLIOJ — *Praha* — Bonega ilustrita prospekto en Esperanto, kun plenaj, detalaj informoj pri la ĉefurbo de Ĉeĥoslovakujo kaj ĝiaj vidindaĵoj.

Kreuth (Germanujo), la idilia kuracloko ĉe la valo de la lago Tegernsee (800 m.) Limas al Aŭstrujo.

Internacia Foiro de Marseille — Internacia Merkato de la Mediteranea Regiono. Ĝi okazas ĉiujara dum la dua duono de Septembro. Informoj: 36, La Canebière, Marseille, Francujo.

Air France — La plej granda reto en la mondo. La unua Eŭropa Kompanio kaj unu el la ĉefaj internaciaj firmoj por aertransporto.

Münchenwiler, apud Murten-Morat, Svislando. Tria internacia kurso pri Esperanto kaj Geonismo. 20-27 Julio 1957 — Kastelo Münchenwiler.

Memorigaĵo pri Dua Esperanto-Kunveno de ŝtato Rio de Janeiro, en Macaé. Donaco de I.B.G.E.

XXI Foiro de Bologna, Majo 1957. La plej impona merkato en la plej grava fervora trafikcentro de Italujo.

LA VIRINO

Victor Hugo

La viro estas la plej alta el la krei-toj. La virino, la plej altega el la idealoj.

Dio al la viro faris tronon; al la virino, altaron. La trono ekzaltas kaj la altaro sanktigas.

La viro estas la cerbo; la virino, la koro. La cerbo produktas la lumon; la koro produktas la amon. La lumo fekundigas; la amo revivigas.

La viro estas la genio; la virino estas la anĝelo. La genio estas nemezurebla; la anĝelo, nedifinebla.

La vira aspiri estas la altega gloro; la virina aspiri estas la ekstrema virto. La gloro kaŭzas la grandecon; la virto, la diecon.

La viro havas la superecon; la virino, la preferon. La supereco signifas forton; la prefero reprezentas la rajton.

La viro estas forta per la racio; la virino estas nevenkebla per la larmoj. La racio konvinkas; la larmoj kortuŝas.

La viro estas kapabla je ĉiaj heroecoj; la virino, je ĉiaj turmentegoj. La heroeco nobligas; la turmentego purigas.

La viro estas kodo; la virino, evangelio. La kodo korektas; la evangelio plibonigas.

La viro estas templo; la virino estas tabernaklo. Antaŭ la templo ni senĉapeliĝas; antaŭ la tabernaklo ni surgenuiĝas.

La viro pensas; la virino sonĝas. La pensado estas havi larvon en la cerbo; la sonĝado estas havi aŭreolon sur la frunto.

La viro estas oceano; la virino estas lago; La oceano havas la perlon, kiu ornamas; la lago, la poezion, kiu allogas.

La viro estas aglofluganta; la virino estas najtingalo kantanta. La flugado estas superregi la spacon; la kantado estas konkeri la animon.

La viro havas gvidilon: la konscienco; la virino, stelon: la espero. La gvidilo kondukas; la espero savas.

Fine, la viro estas metita tien, kie finiĝas la Tero; la virino, tien, kie komenciĝas la Ĉielo.

Esperantigis:

Sylvio Roberto dos Reis Peixoto

LERTA LERNANTINO

Nia samideano A. K. A., Costa, en Belo Horizonte, lernigas Esperanton al sia sepjara filineto.

Por doni al ŝi praktikan ekzemplon pri la verbaj tempoj simplaj, li prenis en la mano glason da akvo, kaj diris: — Atentu, mi tuj *trinkos*. Komencante trinki la akvon, li diris: mi nun *trinkas*. Kiam li finis, li diris: — Mi *trinkis* la akvon.

Ŝi ripetis la tri verbajn formojn, sed ĉar iom da akvo falis sur lian veston, ŝi aldonis, ridetante: — Jes, vi *trinkis* kaj *entornis*. (En la portugala lingvo la verbo *entornar* signifas disverŝi).

Kolinju

MONO

Objekto, kiu povas esti uzata kiel universala pasporto, escepte por la ĉielo; kaj kiel rimedo por akiri ĉion, escepte feliĉon.

MILITO

La militon volas tiuj, kiuj ĝin ne faras; kaj faras tiuj, kiuj ĝin ne volas.

S. Tery

T a m a n d a r é

(*Legendo pri la diluvo, laŭ la
Brazilaj indiĝenoj*)

José de Alencar

Estis malproksime, tre malproksime de la nunaj tempoj.

La pluvo faladis, kaj la akvo ekkovris la tutan teron. La homoj ekiris sur la suprojn de la montoj. Nur unu viro restis en la ebenaĵo, kun sia edzino.

Estis Tamandaré (1), forta inter la fortaj. Li sciis pli ol ĉiuj. Nokte, la Sinjoro parolis kun li, kaj tage li sciigis al la anoj de la tribo tion, kion li lernis el la ĉielo.

Kiam ĉiuj volis supreniri la montojn, li diris:

— Restu kun mi; agu kiel mi, kaj lasu al akvon veni.

Ne atentante pri liaj paroloj, ili suriris la montojn, kaj li restis sola en la ebenaĵo, kun sia kunulino, kiu ne forlasis lin.

Tamandaré prenis la edzinon en siajn brakojn kaj grimpis kun ŝi ĝis la supro de palmo. Tie li atendis ĝis la akvo venis kaj reforiĝis. La fruktoj de la palmo nutris ilin.

La akvo venis, altiĝis, vastiĝis, la suno subiris kaj leviĝis unu, du, tri fojojn.

La tero malaperis, la arboj malaperis; la montoj malaperis.

Kiam la akvo ektuŝis la ĉielon, la Sinjoro ordonis, ke la pluvo ĉesu.

La suno, rigardante, nur vidis ĉielon kaj akvon, kaj inter la akvo kaj la ĉielo, la palmon, kiu surnaĝadis, alportante Tamandaré-n, kaj lian kunulinon.

La torento fosis la teron; fosinte la teron, ĝi forŝiris la palmon; forŝirinte la palmon, ili leviĝis super la valon, super la arbon, super la monton.

Ĉiuj pereis.

La akvo ektuŝis la ĉielon dum tri tagoj kaj tri noktoj. Poste, ĝi malaltiĝis, malaltiĝis, kaj fine aperis la tero.

Ĉe la tagiĝo Tamandaré vidis, ke la palmo estas plantita meze de la ebenaĵo, kaj li aŭdis la ĉielan birdeton *guanumbí* (2), svingante la flugilojn.

Li malsupreniris kun sia edzino, kaj plenigis la teron.

(1) Tamandaré estas la Noa de la indiĝenoj.

(2) Guanumbi estas la kolibro, laŭ la lingvo tupia de la indiĝenoj.

Esperantigis Kotinju

El Notlibro Esperantista

TERUO MIKAMI

Seksmalsano ne estas honora eĉ en Esperantujo.

Ĝi estas en Esperanto — “Seksmalsano”. Tamen la angloj ĝin nomas “franca malsano”, la francoj “itala malsano” kaj la italoj “franca malsano”. (La rebato ne estas justa).

Kiam oni foje kunmanĝis en restoracio, oni foje “kunpagas”. En tia okazo, la portugallingvanoj diras: Ni pagu kiel angloj (pagar à inglesa), dum la angloj esprimas: Ni pagu kiel “Dutch”. Nu, ĉu “Dutch” signifas tie ĉi la nederlandanojn, aŭ la germanojn, mi ne scias. La aŭtoro de esperanta konversacia libro, eldonita en Japanujo, tekstas jene:

— Mi regalos nin hodiaŭ vespere.

— Tute ne, mi pagos.

— Do, ni faru soldatan pagon.

Tiu ĉi aŭtoro notas, ke oni povas ankaŭ diri: Ni pagu germanan pagon. Sed la “soldata pago” estas pure japanisma,

kaj cetere, ĝi estas arkaisma. La "germana pago" ne estas esperantisma ne nur lingve, sed ĉefe ideo.

Se iu forkuras sen saluto, la angloj mokus: Li foriris kiel franco (*take French leave*), dum la francoj diras: Li foriris kiel anglo (*filer à l'anglaise*). (Tio ĉi la rebato estas trafa).

(Eltirita el *Oomoto*, Novembro 1950. T. Mikami estas pseŭdonimo de nia klera samideano T. Nakamura).

ARBARAJ AFORISMOJ

— Ni rikoltas kion ni ne semis, kaj semas kion ni ne rikoltos.

— Rcarbarigu la montojn kaj vi pli grandigos, per paca konkero, la patrujan amplekson.

— Se vi haltigos la akvan guton en la altaĵoj, vi venkos la valan superakvegion, aliformigante samtempe la fonteton je sufiĉega fonto.

— Se vi rigardadas la fruktodonan valon sulkigitan per trankvilaj akvofluoj, surprindirektu la okulojn kaj vi vidos la monton kovritan per arboj.

— Kulturu la montojn, kaj vi fortikiĝos viajn korpon kaj spiriton.

— La arbo estas beleco en kamparo, defendo de la akvoĵoj kaj benata provizo en montoj.

(*La Suno Hispana*)

RIDU, NI PETAS...

Profesoro pri medicino (fingromontrante malsanulon kaj turnante sin al la lernantoj) — Ĉi tiu tumoru kiun vi vidas sur la buŝo de tiu ĉi paciento estas ofta ĉe la muzikistoj. (Turnante sin al la malsanulo): Kia estas via profesio?

Malsanulo — Mi estas muzikisto.

Profesoro — Ĉu vi ĉiuj aŭdis? Estas ĝuste tiel, kiel mi diris al vi. Kaj kiun muzikilon vi ludas?

Malsanulo — Tamburon...

La instruistino — Kie oni trovas la elefanton?

La lernanto — La elefanto estas tiel granda besto, ke estas neeble perdi ĝin...

★

La pastro — Ĉu vi havas iun pekon, mia filino?

La junulino — La vantecon, pastro. Mi restadas horojn post horoj antaŭ la spegulo, admirante mian belecon.

★

La pastro — Ho! mia filino: Tio ne estas vanteco... Tio estas imagemo...

★

La mastrino — Kial vi ne laboris plue en la lasta domo?

La nova servistino — Ĉar mi ne povis elporti la manieron kiel la mastrino kaj la mastro ofte diskutadis: kiam ne estis mi kun li, estis ŝi kun mi...

★

Edzino — Mia edzo estas vere hejmama. Li neniam volas promeni. Li ĉiam preferas resti hejme apud mi.

La amiko de la edzo — Ho, jes!, li ĉiam estis tia: neniam li havis inklinon por sin amuzi.

★

Patrino — Ne diru tion, mia filino. Vi plu neniam devas diri tiajn malbelajn vortojn.

Knabino — Do, kial ili estis elpensitaj, se estas malpermesate ilin paroli?...

Trad. L.M.

Deziras korespondi un gelernantoj, pri terkulturo, Goro Ito, Furutsu Niitsuŝi, Niiga-ken, Japanujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun iu brazilano. Adreso: Stefan Bieganski, Mikstał, przez Ostrow Wlkp., Polujo.

PLANO DE ORGANIZO DE LA BRAZILA ESPERANTO-MOVADO

(Daŭrigo)

- b. Aranĝoj por la publiko
 (1) Ekspoŝicioj.
 (2) Informkunvenoj (inform-vesperoj).
 (3) Informprelego.
 (4) Informsemajno.
- c. Diversaj rimedoj
 (1) Afiŝoj.
 (2) Flugfolioj.
 (3) Murgazetoj.
 (4) Esperantaj surskriboj:
 — en stacidomoj;
 — en telefonejo.
 (5) Verdaj steloj, flagoj.
 (6) Uzado de la lingvo.
 (7) Societa informbulteno.
 (8) Programoj de la societa aktivado (sub formo de flugfolio).
- d. Apartaj rimedoj
 (1) Leteroj
 — al ĵurnalistoj;
 — al altranguloj;
 — al oficialaj kaj privataj instancoj;
12. LA PUBLIKO (Uzo de la rimedoj, interesoj, kiel agi en ĉiu okazo).
- a. La ĝenerala publiko.
 b. La faka publiko.
 c. La gravuloj:
 (1) Aŭtoritatuloj.
- d. La kursanoj
 — Informbulteno preparita por ĉiu leciono (la kursestro uzu ĝin laŭplaĉe).
- e. La societanoj (interna propagando).
 f. La simpatiantoj (kiel konservi bonajn amikojn).
 g. La oponantoj (kia estos nia sinteno).
13. KONTROLO DE LA REZULTOJ
- a. Klasigo de dokumentoj.
 b. Teno de tagjurnalo.
 c. Statistikoj.
- III — INSTRUADO
14. ĜENERALAJŬOJ
- a. Principoj.
 b. Celoj.
 c. Limoj inter instruado kaj kulturo.
15. ORGANIZO
- a. Komisiono por instruado.
 b. Ĝiaj Esperanto-rilatoj.
 (1) Kun la societo:
 — estraro;
 — komisiono por informado;
 — komisiono por kultura vivo.
 (2) Kun Brazila Esperanto-Ligo.
 (3) Kun Universala Esperanto Asocio.
- c. Programo de la komisiono:
 — Principoj:
 — ĉiam pli da novaj instruantoj;
 — ĉiam pli da novaj kursoj (lingvaj aŭ aliaj).
- d. Budĝeto.

16. LA PROGRAMO (celo de ĉiu kurso, detaligo de tiuj programoj).

a. Lingvaj kursoj.

- (1) Elementaj (scipovi interkompreniĝi parole kaj skribe).
- (2) Perfektigaj (eleganta kaj senpena uzo de la lingvo; enkonduko en la literaturon).
- (3) Superaj (kapablo instrui, enkonduko en la literaturajn teknikojn).
- (4) Fakaj (komerca, teknika-sciencia, ktp...).

b. Lingvistika kurso

- (1) Ĝenerala lingvistiko kaj interlingvistiko.
- (2) Esperantologio: evoluo de la lingvo; punktoj atakitaj aŭ nekomprenitaj de eksteruloj (akuzativo, refleksivo, afiksaro, ktp).
- (3) Klara superrigardo pri la deveno, strukturo kaj karakterizoj de Esperanto.

c. Literatura kurso

- (1) Zamenhofaj verkoj.
- (2) Niaj aŭtoroj beletraj (prozo kaj poezio).
- (3) Sciencia kaj teknika literaturo.
- (4) Klara superrigardo pri la historio, digno kaj amplekso de nia literaturo; ebligado aliri al niaj ĉefverkoj kaj gustumi la altajn esprimkapablojn de nia lingvo.

d. Historia kurso

- (1) Zamenhof: vivo kaj laboro.

(2) Historio de la movado.

(3) Organizo de la movado (UEA, naciaj asocioj, internaciaj kaj fakaj asocioj).

(4) Klara bildo de la kontinua klopodo de la esperantistoj ekde Zamenhof, kaj la unuaj pioniroj, ĝis nun, por doni al la indiferenta mondo komunan lingvon serve al Paco, Homeco kaj Kulturo.

e. Propaganda kurso

— Disvolvo de refleksoj, kiuj permesos al la lernintoj taŭge propagandi en la kutimaj okazoj de la ĉiutaga vivo.

17. LA METODOJ

a. De la lingvaj kursoj principoj kaj priskribo por ĉiu grado; bibliografio pri nun ekzistantaj metodoj kun recenzo).

- (1) Gramatika kurso.
- (2) Rekta kurso.
- (3) Miksa kurso.
- (4) «Kerna» kurso (laŭ Setälä).
- (5) Dulingva edukado (denaskaj esperantistoj).

b. De la lingvistika kurso.

c. De la literatura kurso.

d. De la historia kurso.

e. De la propaganda kurso.

18. FORMO DE LA INSTRUADO

a. Kursoj

(1) Parolaj kursoj.

— societaj;

- oficialaj (en lernejoj).
- (2) Perradiaj.
 - (3) Korespondaj.
 - (4) Pergazetaj.
 - (5) Memlernaj (lernolibroj en librejoj kaj bibliotekoj).
- b. Studrondoj (krome ebligi eĉ pli fakajn studojn: parolarto, praktika psikologio, muziko, stenografio, ktp).
- c. Ekzercaj kunvenoj (vesperaj ekzercoj).
19. «POLITIKO» DE LA INSTRUADO
- a. Ĝeneralaĵoj (kontinueco: simpatianto-kursano-klera esperantisto).
 - b. Antaŭ la kurso:
 - (1) Preparo
 - ejo kaj tempo;
 - instruanto (li mem elektos sian metodon).
 - medio.
 - (2) Informado
 - ĝenerala;
 - speciala (anonco de la kursoj);
 - prelego, ktp.
 - c. Ĉe malfermo
 - (1) Enskribiĝo.
 - (2) Pago aŭ ne.
 - (3) Livero de dokumentoj, ktp:
 - nacilingva informgazeto;
 - propaganda broŝuro;
 - folio pri ekzamenoj;
 - folio pri aktiveco de la societo;
 - kursolibro, se necese.
 - d. Dum la kurso:
 - (1) La kursestro.
 - (2) La kurso mem:
 - ĝeneralaĵoj (alloga, efika, simpla).
 - por komencantoj;
 - perfektigaj;
 - superaj.
 - (3) Informado
 - pri sukcesoj de la movado;
 - pri agado de la loka societo;
 - pri novaj literaturaj verkoj, ktp.
 - (4) Unua aktiva partopreno en esperanta vivo
 - invito al societa vivo;
 - internacia korespondado;
 - invito al ekskursoj, karavanoj, kongresoj, ktp;
 - propono de libroj el la societa biblioteko aŭ el la libroservo;
 - propono de aliĝo al faka (profesia, ktp) interesa internacia asocio.
 - e. Ĉe la fino
 - (1) Organizo de ekzamenoj kaj konkursoj.
 - (2) Festo por disdono de premioj.
 - f. Post la kurso
 - (1) Konservado kontakton:
 - anonci superan kurson (aŭ alian);

(Fino venos)